
Turangla 29 Luko

1-a trimestro 2013




En tiu numero vi legos..

Dominique Baron raportas pri la urbeto Vernou.	p.1
Jacques Gaumé kolektis inter la leteroj de Emile Bézier, la frazojn kiuj temas pri la laborista vivo.	p.2 kaj p.3
Por kompletigi niajn sciojn pri Renesanco, Jane Pinon aldonas historiajn eventojn.	p.4 kaj p.5
Ni restu kun historiaj eminentuloj dank'al Franca Cipriani, kiu estas najbarino de la naska urbo de Mazarin.	p. 6
Pretigante la artikolon de Jane Pinon, ni havis demandojn pri la "ŝipo", donacita al Anne de Bretagne. Jen kelkaj klarigoj proponitaj de Jacques Gaumé.	p. 7
Popoldancoj estas alia hobio de Hélène Alessandri, ŝi invitas vin al dancado.	p. 7

Iom pri Vernou

La 14an de Aprilo 2013, ni vizitos la kastelon de Jallanges en Vernou/Brenne.



la blazono de Vernou/Brenne

Vernou jam ekzistis en la jaro 494 sub la nomo Vernadum. La alnoj antaŭe nomiĝis la « vernes » en la franca lingvo. De tio devenas la nomo Vernadum kaj Vernou (loko plantita de « vernes »). Sankta Perpet konstruigis la preĝejon de la vilaĝo en 494. La baroneco de Vernou apartenis al la arkiepiskopoj de Tours de la jaro 1119.

La historiaj arboj iĝas pli kaj pli raraj. Kelkaj belegaj specimenoj kun eksternaturaj proporcioj ankoraŭ staras kaj venkas la eventojn kaj jarcentojn. Ilia grandega trunko videblas sub giganta sunombrelo el ĝia ombra foliaro. La vivdaŭro de tiaj arboj datumas post la VIIa jarcento, ĉar la dudek unua kanono de la koncilio de Nantes en la jaro 658 devigis la episkopojn dehakigi kaj bruligi la arbojn ankoraŭ adorataj de la popolo.

Staras en Vernou, sur la ridetantaj bordoj de la Loire, ulmo, kies trunko sensukiĝas kaj nigriĝas pro longaj sulkoj. Oni scias, ke la ministro Sully, proponis al la reĝo Henriko la Kvara devigi la privatulojn planti ulmojn laŭlonge de la vojoj por ornami ilin. Estas loka tradicio, ke tiu ulmo estis plantita de la duko de Sully. Mi ĵus eksciis, ke temas pri ne unu sed tri ulmoj kaj, ke oni dehakis ilin en Novembro 1998.

Dominique Baron



VERNOU-SUR-BRENNE (I.-et-L.). - La Place et l'Orme de Sully.

Laborista vivo

Tie mi estas preskaŭ bone pagata (ĉirkaŭ 50 frankoj tage) sed la vivo estas malfacila por la malriĉuloj kaj bedaŭre multe da homoj ne komprenas ankoraŭ ilian klasan devon kiu estas unuiĝi en sindikato por havi pli altajn salajrojn.

Mi vidas ke de via flanko vi ne estas pli feliĉa ĉar vi estas sen laboro kaj la subvencio ke vi havas estas tute nesufiĉa por vivi. (W 25/10/30)

« Homo kiu laboras estas pli respektinda ol, homo kiu neniam laboras pro sia malkuraĝeco » ;(W 21/12/30)

Nun pri la filmo : « En okcidento nenia novaĵo ». kredu, ke si en Francio ekzistis unu filmo sama ol la verko de E. M. Remarque, la francaj faŝistoj, estus aginta tiel kiel la germanoaj faŝistoj, sed mi pripensas ke la registaro estus rifuzinta malpermesi la filmon, ĉar la laboristaj organismoj kontraŭ protestus. (W 21/12/30)

All Quiet on the Western Front estas Akademia-Premiita filmo bazita de la romano de Erich Maria Remarque, En Okcidento Nenio Nova.



Mi opinias, tiel kiel, vi ke la faŝista partio estas la partio de la stulteco. W 21/12/30

Ne, la estonteco ne apartenas al tiuj homoj, aŭ tiam, la homaro nepre pereas, sed iom post iom la socialismo disvastiĝos pli kaj pli por la feliĉo kaj la paco de la tutmonda homaro. (W 21/12/30)

Kiam do ! ĉiuj tutmondaj landoj estos regotaj, laŭ la socialista konceptado por forĵeti la malsanon kapitaliston kaj por ke ĉiuj laboristoj laboras kaj vivas feliĉe. Mi timas, ke mi multe devas labori ankoraŭ por atingi tiun celon. (W 18/01/31)

Nunmomente mia laboro estas tre strecâ, ĉar estas la sezono de la libertempoj kaj multe da vagonaroj (kiuj ne okazas kutime) okazas nun por alkonduki la riĉuloj al la marbordo, la montaro aŭ en Parizo por viziti la tiean ekspozicion okazantan nun, kaj mi devas prepari la lokomotivojn, pro tio mi havas multe da laboro. (L 9/8/31)

Ĉar vere la laboristoj ne bezonas esti malsanaj, ĉar ili ne havas nek tempon nek monon por esti malsanaj, kaj ili bezonas ĉiujn siajn fortecojn por gajni salajron, kiu jam ne estas tro alta por povi dece vivi.(L 20/9/31)

Sed ofte la strecâ laboro kaj la malbonaj laborkondiĉoj estas la kaŭzo de nia malbona farto.

La malbona aero, kiun ni spiras en la laborejoj, ĉiam estas malpurigita per la fumo aŭ la polvo. Laŭ mia opinio, (tio estas ankaŭ la opinio de ĉiuj laboristoj), la gelaboristoj ne ĝuas sufiĉe la eksteran aeron, kaj ankaŭ, ni ne gajnas sufiĉan salajron por povi libertempi, dum almenaŭ 15 tagoj, ĉu sur la kamparo, ĉu al la marbordo. Tamen, nur ni bezonas plibonigi nian sanon, kaj nin ripozi por povi, post la libertempo, fari la strecân laboron. (L 20/9/31)

Sed, ĉi tiujn bonajojn nur ĝuas la riĉuloj. Nur ili rajtas vivi agrable, la gelaboristoj devas labori por gajni la monon, per kiu, ili, la riĉuloj, povas havi la feliĉon kaj kontentigi ĉiujn siajn dezirojn. Tamen se ni volus, ni povus plibonigi nian staton kaj niaj vivkondiĉojn.

Tion ni devas klarigi al niaj gekamaradoj. Ni, socialistoj, devas multe labori por starigi tra la mondo novan socion socialistan, en kiu, ĉiuj havos la samajn rajtojn. (L 20/9/31)

Nun mia laboro fariĝas malpli strecâ kaj denove mi povas korespondadi pli ofte kun vi kaj miaj aliaj korespondantoj.(L 20/9/31)

Laŭ mia opinio tutmonda revolucio necesas por ĉesigi tiun staton.

Sed bedaŭre, ni, laboristoj estas tro disigitaj, pro la politiko, por sukĉesi tiun agadon. (W 6/10/31)

Baldaŭ estos la vintro, mi povos korespondi pli ofte, ĉar nun mia laboro estas malpli streĉa, ol antaŭ, kaj mi havos pli da tempo por skribi. (W 6/10/31)

Ni esperu, eble, nia sorto fariĝos pli bona, ĉar franca proverbo diras : « Espero vivigas », sed miaopine, espero ne donas manĝaĵojn. (W 31/10/31)

En Francio la senlaboruleco multe krekas, la vera nombro de la senlaboruloj estas nun je 1900000, certe la oficialaj ĵurnaloj ne konfesas tion, ili skribas nur 850000 laboristoj ne havas laboron, sed skribante tion ili mensogas.

Per tio oni ne povas multe aĉeti, ĉar la vivbezonaĵoj estas tre kostaj. Sed mi ne bezonas skribi tion al vi, ĉar bedaŭrinde vi, de longe, spertis tion. Ŝajnas al mi ke tia stato de la internaciaj aferoj ne povas longe daŭri, kaj ke la kapitalismo travivas siajn lastajn tagojn. Bedaŭrinde la laboristaro estas tro disigata kaj tio multe helpas la kapitalismon kiu deziras, ke longe la kapitalistoj estu disigataj ĉar tiom longe ni estas disigataj, tiom longe ĝi povos nin konduki kiel ŝafojn al la buĉejo. Do nia devo al ni esperantistoj, estas disvastigi per nia lingvo, la internacian fratecon. (W 29/11/31)

Do pro tio, mi ne promenis de la 2-a de Januaro, tial mi ne povis iri al la poŝtoficejo sendi mian kotizon al S.A.T. kaj ankaŭ la ŝparmono foriras, kvankam mi havas mian salajron dum mia tuta malsano.(W 1/2/32)

Komencante mian leteron, mi petas vian pardonon pro mia longa silento. Sed… de la 5a de Marto ĝis la 6a de aprilo min ne estis hejme.

Dum tiu tempo mi estis sendita en alia lokomotivdeponejo, por anstataŭi iun kamaradon malsaniĝintan, por skribi mi tempon ne havis, ĉar en tiu lokomotivejo, multe da manovroj oni devas fari. Tie oni apartigas la vagonoj por grupi tiujn, kiuj iras al sama direkto, kaj formi longajn vagonarojn transportantajn diversajn komercaĵojn.

De la 5a de Marto ĝis la 5a de Aprilo mi ripozis nur trifoje, dum unu tago ĉiufoje. (L 10/4/32)

Vi povas kompreni, ke dum tiu ripozo mi ne ŝatis skribi. Sed de la 10a de Aprilo ĝis la 18a de ĉi monato mi libertempas, kaj tiel mi povas respondi al ĉiuj korespondantoj miaj. (L 10/4/32)


Feliĉaj ni estas en Francio konstati, ke la germana popolo ne volas militi, sed mia opinie, tio estas la rezultoj de la penoj de la socialistoj, kiuj ĉiam predikis kontraŭ la milito kaj la kapitalistoj, kaj la popoloj ĉiulande komprenis ke la nura milito farebla, estos la milito de la laboristaro kontraŭ la kapitalismo por starigi novan ŝtaton donantan feliĉon nur al tiuj kiuj laboras ĉiutage por ĉies bezono. (L 10/4/32)

Kiel vi kara amikino, mi sopiras al la dimanĉo por iri promeni tra la kamparo. Venontan dimanĉon, la fiŝkaptado estas denove permesita, ĉar en Francio estas kutimo, malpermesi la fiŝkaptadon dum du monatoj, por ke la fiŝoj povu naski idojn (ĉu vi komprenas ?)

Do venontan dimanĉon, frumatene, ni per bicikloj forlasos la domon, kaj pasigos la tutan tagon ĉe la riverbordo, provante kapti multe da fiŝoj. Ĉu vi ŝatas fiŝkapti Foje mi skribis, al mia kara amiko Walter, tion kaj al li mi tion respondis : Mi preferas kapti la fiŝojn kiam ili estas kuiritaj en la pladoj. Do dum la somero mi ofte iras fiŝkapti, ĉar mi opinias kaj mia edzino ankaŭ, ke la puran aeron spiritan kampare resanigas nin, kaj laŭ mia opinio, nenio estas pli bela ol la naturo, ĉu vi opinias kiel mi ? jes sendube, ĉar mi scias ke miaj gekamaradoj en Dresdeno estas naturamikoj, kaj multe ŝatas migri tra la kamparo ĉirkaŭanta Dresdenon. (12/6/32)

Bedaŭrinde estas, ke la laboristaro ne komprenas kiom forta ĝi estus, se la laboristoj kiuj ĝin konsistigas, unuiĝus. Do kara kamaradino, ni devas labori por tion komprenigi al niaj samsortuloj, kiu estas ankoraŭ ekstere la laborista movado.(L 24/10/32).

Jacques Gaumé



Malgranda sekvo pri Renesanco

Kiam vi vizitos kastelojn de Valo de Luaro, oni parolos al vi pri la renesanca periodo.


Jen kelkaj utilaj referencoj:

LOUIS XI (Le Plessis les Tours) regas de 1469 ĝis 1483

CHARLES VIII (Langeais - Amboise) regas de 1483 ĝis 1498, edziĝas kun ANNE DE BRETAGNE en 1491 - Charles 21 jaraĝa kaj Anne 14 jaraĝa.

ANNE vidvino de Charles, edziniĝas kun LOUIS XII en 1499

LOUIS XII (Blois) regas de 1498 ĝis 1515



FRANCOIS Ier (Chambord - Blois) regas de 1515 ĝis 1547, konstruigas la grandegan kastelon de Chambord finitan sub Louis XIV ; ĝia arkitekturo naskiĝis en la menso de Leonardo da Vinci.

Jen kelkaj skribaĵoj kompletigantaj la artikolon de Waringhien en la unua paĝo de la libreto eldonata de J. Gaumé la 8an de Decembro 2012 .

LOUIS XI EN TOURS

Certe la ĉeesto de Louis XI en Tours multe kontribuas al la disvolvado de la urbo, sed ne estis tre agrabla por la urbestraro kaj la loĝantoj. Kiel ĉiuj ‹bonaj urboj›,Tours devis pagi kromkostojn, pruntedonojn, impostojn dum la milito kontraŭ Burgonjo aŭ kontraŭ Bretonio. Oni rekvizicias ĉevalojn, ĉarojn por trakti artileripecojn aŭ proviantojn.Sed pezas sur la urbo aliaj specialaj kromkostoj. Tiel viandistoj plendas devi nutri vintre Reĝinajn birdojn. Ankaŭ Turanĝanoj devis gvati. Vintre ili devis fari servutojn, ekzemple la urbestro devis iri kun nomumitaj loĝantoj sur la rivero Cher por rompi glacion, kiam la reĝa ŝipo pasos

Eltiraĵo de Pierre Champion ‹Louis XI ›

SOLENA ENIRO DE CHARLES VIII KAJ ANNE DE BRETAGNE EN TOURS.

Charles VIII edziĝas al Anne de Bretagne la 16an de decembro 1491.

De Langeais venis al Tours la novgeedzoj. La nova reĝino de Francio faris sian festenan solenan eniron dum du sinsekvaj tagoj.

La moŝtoj de la urbo en solena talara vesto, la




klerikaro, la burĝaj metiaj korporacioj atendis Anne je la ekstremaĵo de la pontoj de St SYMPHORIEN ; post la kutimaj salutoj, la reĝino iris sub honorbaldakeno, portata de kvar eminentuloj ĝis eniro de la kastelo, kie la kapitulo de St Gatien prezentigis proprakoste ‹le Mystère des Sibylles›, de kie la procesio reprenas sian marŝon tra la Grande Rue ĝis Place Foire le Roi, kie la urbo prezentigis ‹le Mystère de Salomon et de la Reine de Sabba›, pli malproksime sur ‹le Carroi de Beaune› oni ludas ‹le Mystère des neufs preuzes›, antaŭ la portalo de la urbodomo, grupon de junulinoj riĉe ‹estoffées à l' Antique› kaj starantaj sur podio prezentis blazonojn de la reĝo, de la reĝino kaj de la urbo. En ‹le Carroi des Chapeaux› (Rue du Change) oni prezentas ‹Le Mystère de Madame Sainte Anne›, fine en la portalo de Boulevard de Notre Dame la Riche ‹Le Mystère du Roi Assuerus›.En tiuj ĉi teatroj, ornamataj de pentritaj toloj kaj de verdaĵo, kvar menestreloj sonoris per siaj muzikiloj.

Sur la irvojo de la procesio, la eminentuloj de la urbo, kiuj elspezis nenion, abunde regalas princojn kaj sinjorojn de la kortego per "hypocras" kaj sukerita varma vino parfumita per cinamo, kariofilo kaj zingibro. Krome la urbo faras donacon al la juna Reĝino de miniatura velŝipo (*) de orumita argento, laboro de la oraĵisto Jean Galland estimata je 840 pundoj.

Eltiraĵo de GIRAUDET (Histoire de la ville de Tours)

FRANCOIS Ier, reĝo de 1515 ĝis 1547 ordonas per edito de VILLERS COTTERETS, la anstataŭigon de la latina lingvo per la franca lingvo en juĝoj, notariaj aktoj kaj registroj de civila stato. Li subtenas Literaturon kaj Artojn ; allogas en sia kortegon poetojn, pentristojn kiel Leonardo da Vinci. Li fondas le ‹Collège de France› kaj ‹l'Imprimerie Nationale›.

* vidu klarigojn p. 7 *Jane Pinon*



Joris Hoefnagel, Tours en 1561

Kardinalo Mazarino



Apud urbodomo de Pescina

Ĉiufoie mi estas trapasanta Pescina-n (Peŝina), malgrandan vilaĝon en la provinco L'Aquila, mia rigardo estas altirita de majesta kastelo mezepoka. Ĝi estas parte ruiniĝinta sed unu turo, bone konservita, elstaras super la domaro kaj la riverbordoj de Giovenco (Ĝovenko) kiel gardostaranto. En ĝia ombro, alkroĉita al apika flanko, alrigardante sovaĝan kluson, pavas konstruaĵo nobligita per konformaj arkoj. Estas kio plurestas el loĝejo de la familio Mazarino. Apud ĉi tiuj antikvaj restaĵoj estas moderna muzeo, kiu gardas gravajn dokumentojn pri la agado de la historia persono de Abruco deveninta.



restaĵoj de la kastelo muzea domo de Mazarino

Kardinalo Giulio (Ĝuljo) Raimondo Mazarino naskiĝis en la jaro 1601 en Pescina, kiam ĉi tiu vilaĝo apartenis al Napola Regno. Li studis en jezuita kolegio de Romo, kie ne fariĝis pastro, sed nur diakono. Poste li daŭrigis siajn studojn pri eklezia juro en Hispanio kaj, en la jaro 1628, li magistriĝis pri "utroque jure" en Romo. Dum la milito de la "30-jaroj" Mazarino, kiel sekretario de la papa legato, klopodis akordigi Francion kun Hispanio per diplomatia solvo, kiu konkludiĝis la 6an de Aprilo 1631 per la Packontrakto de Cherasco (Kerasko). Tiel profita ke reĝo Luizo XIII kaj la ĉefministro Richelieu persone volis koni Mazarino kaj donaci al li orĉenon kun portreto de la reĝo, aliajn oraĵojn kaj altvaloran spadon.

Ok jarojn poste, Richelieu alvokigis lin al la kortego por gravaj taskoj, kiuj igis lin tre fama kaj amata.

Forpasinte Richelieu, Mazarino iĝis oficanta ministro kaj, post unu jaro, surprenis la francan regentecon kune kun la reĝino Ana de Aŭstrio. Subtenita de la juna Luizo XIV, Mazarino venkobatis la "frondo-n" fortifigante la reĝan aŭtoritaton. Plue, per la Pactraktatoj de Westfalia (1648) kaj de Pireneoj (1659), li sukcesis pacifigi Francion kun Hispanio, firmigante la francan superregadon en la Eŭropo de tiu tempo.

La 9an de Julio de la jaro 1660, sigelo pri la definitiva fino de la militado estis la geedziĝo de la reĝo kun Maria Tereza de Aŭstrio, filino de Filipo IV, kies Mazarino ditale prizorgis la intertraktojn. Kvankam malsana pro nefrito, li volis sekvi la nuptan procesion.

La sekvantan jaron, ĉar sia malsano pliakriĝis, li enhospitaliĝis en Vincennes, kie mortis la 9an de Marto.


Mazarino lasis siajn spurojn ne nur en politika medio, sed ankaŭ en la literaturhistorio. Aldone al la fakto ke li skribis iujn verkojn (Breviario dei politici; Lettres du Cardinal Mazarin à la Reine…), li estis unu el gravaj personoj de la famaj romanoj de Aleksandro Dumas.

Franca Cipriani

La velŝipo de sankta Ursulo

Jen titolo de artikolo, kiun oni povas legi, paĝo 72 sur magazino "Dossier de l'Art, n° 193", kies temo estas "Tours 1500, capitale des arts".

«La deveno de la velŝipo de sankta Ursulo dum longa tempo malakordigis la historiistojn ĝis kiam Charles Oman sugestas, ke temas pri la velŝipo ofertita al la reĝino Anne de Bretagne okaze de ŝia eniro en Tours, la 26-an de novembro 1500. Tiam la reĝa paro revenis post vojaĝo el la Bretona duklando. »





Do, Anne de Bretagne denove ricevis velŝipon. Dank'al tiu artikolo oni havas bildon de tiu valora donaco.

«Mezepoke oni uzis tiaj "velŝipoj" kiel salujoj ĉar ilia formo rilatis al la mara deveno de la salo. Povas esti ke la granda valoro de tiu substanco, tre kosta tiutempe, donis gravecon al tiuj tablaj velŝipoj. Dum Renesanco, la velŝipo staras sur la princaj tabloj nur por indiki la honorlokon, kiun oni rezervas por la ĉefa invitito. Ĝi ankaŭ utilas kiel ujo en kiun oni metas la proprajn manĝilarojn de la honorita gasto por lin protekti kontraŭ venenado.»

J. Gaumé

POPOLDANCOJ ? TRADICIAJ DANCOJ ? FOLKLORAJ DANCOJ ? KIO ESTAS ĈIO



Kampare, la danco estis ne nur ŝatokupo, kiel nuntempe, sed grava rimedo por plifortigi ligilojn inter samvilaĝanoj. Ĉiu vilaĝo havis sian propran dancon. La plej malnovaj dancoj estas la rondodancoj, kies paŝoj estis simplaj, ĉar dancante oni devis samtempe kanti por sin akompani. Ĝenerale, iu dancanto estis la gvidanto/kondukanto : li sole kantis strofojn po unu kaj atendis la respondon de la aliaj dancantoj ; foje, paroloj de tiuj kantoj donis informojn aŭ konsilojn pri la vetero, la kampolaboroj aŭ la ĉiutaga vivo. Poste la rondoj malfermiĝis kaj iĝis ĉenoj, la dancopaŝoj iĝis pli kompleksaj ĉar tiam muzikistoj ludis muzikiloj, kiel ekzemple fluto, sakofluto, violono, por akompani la dancantoj. Per danco oni montris sian viran forton aŭ sian virinan lertecon. Pli kaj pli, mallongiĝis la ĉeno ĝis ĝi entenis nur unu viro kun unu virino kaj iĝis pare procesio ; fine aperis pardancoj, kiuj el burĝaj salonoj disvastiĝas en kamparoj.

Sed ekde la dua duono de la XIXe jarcento, la mondo ŝanĝis, pli kaj pli da gejunuloj foriris al la urbo kaj primokis malnovajn kutimojn. Oni ne plu dancis hejme en la korto de la bieno okaze de edziĝo, de rikoltfino aŭ eĉ por kompakti la grundon

de nova ĉambro, sed en balejoj. Danco ne plu estas parto de la ĉiutaga vivo en komunumo, sed amuzilo, rimedo por renkonti aliaj personoj kaj oni malpli kaj malpli dancas tradiciajn popoldancojn ĝis ili preskaŭ tute malaperas ĉirkaŭ 1910.

Sed ili revivis. Unue kiel folkloraj spektakloj : ĉi tiujn spektaklojn prezentas, en regionaj kostumoj, dancistoj, kiuj ofte neniam vidis la originajn dancojn. Ili ne montras la veron sed bildon pli malpli plibeligitan pro la bezono de la spektaklo. Laŭ mi, ili spegulas tradiciajn dancojn kiel zooj spegulas la sovaĝan vivon. France, folkloraj grupoj ege kreskis inter la du mondmilitoj kaj ili naskigis entuziasman scivolemon je personoj, kiuj tuj iris kolekti dancoj en kamparaj vilaĝoj (bedaŭrinde, jam malfrue ; plejofte ili renkontis homojn, kiuj ne mem dancis sed vidis en sia infaneco danci siaj gepatroj). Paralele, dum la tridekaj jaroj, oni ekinteresiĝis pri la popoldancoj, kiel rimedo de harmonia elkresko, sekve al ŝatado pri nova fako : la korpa



edukado.

Fine, post Majo 1968, aperis la « folk » movado, kiu revivigas ne nur la tradiciajn kantojn kaj dancojn baze de kolektado, sed ankaŭ malnovajn regionajn muzikilojn, kiel buŝharpon, vjelon, vogezan citron, ktp. Krome, ĝi inventis la folkbalon, kie oni dancas tion, kion oni konas (aŭ kredas koni) el tradiciaj regionaj aŭ fremdaj repertuaroj (bureoj, bretonaj dancoj, ejraj ĝigoj, …), popolajn pardancojn (valsoj, mazurkoj, polkoj, skotiŝoj), kaj eĉ renesancajn dancojn (branlo). En tiuj baloj eblas lerni la bazajn dancojn per imitado ; gravas nek la kostumo nek la paŝoj. Tamen, oni plejbone ĝuas tiujn momentojn, se oni konas la dancojn. Do kursoj kaj staĝoj obligis por lerni paŝojn kaj figurojn kaj samtempe la historion de landoj aŭ regionoj.

Sed la ĉefa afero estas, ke en tiuj folkbaloj, oni retrovas la plezuron de la komuneco. Ekzistas internaciaj festivaloj kiel Gennetines (franca loko apud Moulins), en kiuj partoprenas pli ol du miloj da dancantoj kaj muzikantoj je iu ajn aĝo kaj el pluraj landoj. Mirinde ! Mi donas al vi du ligilojn de retaj videaĵoj por ke vi povu gustumi tiun etoson :

http://www.youtube.com/watch?v=qaScWBYfcHw&feature=player_detailpage

http://www.youtube.com/watch?v=3gEc6XVpZG0&feature=player_detailpage

Plibone, provu dum la venonta somero : trifoje (la 2-an de Junio, la 7-an de Julio, la 1-an de Septembro) okazos eta folkbalo ĉe la « Guinguette du pont Wilson » , luarborde, dum dimanĉaj posttagmezoj de la deksesa ĝis la du deka. Venu kaj dancu !

Hélène Alessandri

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kunigas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr